
# Aŭstraliaj  Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 14/04/2022 Kvincentsepdekoka eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greanvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *Esperanta Retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj" korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 747,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 298,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 183,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 162,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 104,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde junio 2022)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn ktp *Roger Springer*



la esperanta retradio

Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.



BESTOJ BEZONAS ARBARAJN PONTOJN 5a Aprilo

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917

**EKSTRAÎOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). Numero 10 de "Por Progresantoj".**



GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:

1). Kiam en unu propozicio du aŭ pli subjektoj aŭ objektoj estas permesataj?

2). Nomu la konjunkciojn en Esperanto.

3). Ĉu propozicio povas havi subordan frazparton sen ĝia ĉeffrazo?

4). En "Kaj rapide kreskas la afero per laboro de la esperantoj"
ĉu "per laboro de la esperantoj" estas suborda frazo? Kaj kial jes aŭ ne?

5). Ĉu la konjunkcioj uzatas ankaŭ inter tutaj propozicioj?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 578. *Marcel Leereveld.*

# La adelajdaj esperantistoj klubumis ree per Zoom.

La ĉefa temo de la vespero estis Edinburgo, la ĉefurbo de Skotlando, prezentita de Andrew Woods.

## Ondo de pacemo

Ni estas kontraŭ milito kaj naciismo, ni estas por paco", — skribis Halina Gorecka kaj Aleksander Korĵenkov en la redakcia artikolo de la marta eldono de *La Ondo de Esperanto,* kiu aperis la 29an de marto. Legu la artikolon en nia novaĵretejo https://sezonoj.ru/2022/03/ondo-94/

## Muziko por vi

Jen "Duono" de Tantsy Minus en Esperanto, Kantas Evelina Sokolova, gitarludas Jan Karapetjan.

https://www.youtube.com/watch?v=ZDqBnCIBow0

*Katja Steele*



# El Brizbano 07 Aprilo 2022




BES ĵaŭda babilado – Caroline, Doug, Claire. (Paŭlo fotis. John mankas maldekstre de la bildo)



Post la kafo, biskvitoj kaj kukoj, Doug montris la faradon de pano uzante acidan paston.
Supre, Claire kaj Doug knedis la paston acidan. Caroline kaj John observas kaj refoje,
Paŭl faras la bildon.

*Doug Eising*

(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917

# La klereco de Trevor Steele.



## PRI MILITOJ KAJ SOLDATOJ.

Antaŭ du semajnoj aperis en A.E. artikolo de Trevor Steele kiel respondo al aliaj artikoloj pri soldatoj kaj armeoj kaj militoj.. Mi trovis lian respondon tiom informa kaj ĝusta, ke mi ne povus trovi pli kleran ie ajn. (A.E. 576).

Ĉe la fino de la bonega artikolo Trevor skribas:

"Nia sola ŝanco eviti katastrofon estas tutmonda kunlaborado. Tio implicas forigon de la nunaj potencstrukturoj."

Pro tiu konsilo de Trevor, mi esperas ke li baldaŭ daŭrigos sian klaran klarigon por montri al ni, kiel forigi tiujn potencstrukturojn. Mi antaŭvidas tian artikolon, kun dankoj.

*Marcel Leereveld*.

https://www.globaltimes.cn/special-coverage/Ukraine-Tensions-Timeline.html



_kaj por la historio de la situacio, la aliaj flankoj de la kialoj kaj la nuna situacio.
https://www.greanvillepost.com/ https://sputniknews.com/ indian world news

Usona vs Rusio estas propaganda milito. Ambaŭ flankoj uzas propagandistojn, sed Usono uzas spertajn profesiajn propagandistojn. Informiĝu pri ambaŭ flankoj antaŭ ol kredi ion ajn



*Roger Springer*

## SOLVOJ DE LA KVIZETOJ: *(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



. 1). Se ili havas konjunkcion inter si kaj sekvas unu la alian. (kaj jene:)
"La patro iris al la budaro, kaj ankaŭ la filo").

2). Kaj, aŭ, sed, escepte ke, krom ke, (ĉar).

3). Ne.

4). Ĝi estas adjekto, ĉar oni povas anstataŭigi ĝin per "tiel".
Ĉar ĝi estas la kerno de frazparto, ĝi ne povas esti ankaŭ sia suborda frazo.

5). Jes.

*Marcel Leereveld*

## 3ZZZ

La elsendo de la 11a de aprilo informas pri diversaj eventoj en la movado .

Kvankam la retejo de 3ZZZ nun ebligas rete aŭskulti la elsendojn ekde la 4a de aprilo, la arkivoj ankoraŭ ne estas pretaj . Iom da pacienco, mi petas.



*Franciska Toubale*

En ĉi tiu sperta mensoga mondo , mi ĉiam provas sekvi la monon por eble trovi la veron. Ĉiam mi demandas min, kiu gajnas per la fia ago? Kaj ne ĉu homoj kapablis tiel fie agi. Fakte ni estas nur peonoj por la regantoj de nia ne perfekta mondo. *Roger Springer*